

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

Internacia

SEMAJNA

Neŭtrala

ELDONANTOJ:  
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)  
W. M. Page, adv., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gili Noria, Barcelona  
Teo Jung, Köln (Kolonjo)  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

REDAKTOROJ:  
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.  
Kun-redaktoro: M. Butin.  
Felieta red.: Zanon.

ADMINISTREJO:  
Horrem bei Köln, Germ.  
Poŝtekkonto Köln 70865,  
por Teo Jung, Horrem.

ANONCOJ  
el ĉiuj landoj 5 germ. mk.,  
po cm², ĉe grandaj aŭ  
ripetataj anoncoj rabato.

Por la Jubilea Numero (N-o 100)  
**Varbu Anoncojn**  
de seriozaj komercaj firmoj!

Numero 91 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 2. Julio 1922.

# 2-a Internacia Konferenco de Foiroj

Helsinki, 10.—11. Aŭgusto 1922.

La Finnlanda Foiro, A. S., invitas al la II-a Internacia Konferenco de Foiroj okazonta en Helsinki la 10.—11. aŭgusto 1922 (Esperanta Sekretariejo: Punavuorenkatu 22) per sekvanta cirkulero:


La referatojn, rezultintajn de la I-a Internacia Konferenco de Foiroj, en Praha, kaj kiuj poste estas senditaj por la konferenco, okazonta la 10-an kaj 11-an de venonta aŭgusto, la Finnlanda Foiro permesas al si per ĉi tio resume konigi al la interesatoj de la kunagado de foiroj.

Kiel plej facile efektiveblas la iniciatintoj rigardas starigon de komuna „Foiro Kalendaro“. Kaŭze de tio, ke la produktoj, kiuj estas ekspozitaj en la div. foirlokoj ne povas esti sufiĉe pripropaganditaj per nunaj reklamiloj kaj ĉar tia presaĵo publikigita de foiro sola, fariĝas tre kara, kaj ne ĉiam prezentas sufiĉan materialon por la naciaj gazetoj, tial publikigo de aludita „Foiro Kalendaro“ estas tre rekomendita.

Ĉar la tempa koincido de diversaj foiroj tre nekonvenas al komercistaro, kiu ilin vizitas por konatiĝi kun la industrio de diversaj landoj, la ĉiita kalendaro, enhavonta interalie diversajn komercajn sciigojn, fariĝus tre utila. Redaktantoj de ĉi „Foiro Kalendaro“ devus ankaŭ prizorgi koncernan propagandon en la naciaj gazetoj, ĉe kio ili farus grandan servon al la produktantoj kaj aĉetantoj, kiuj pro lingvaj kaŭzoj ne povas konatiĝi kun la kalendaro mem.

Por faciligi internaciajn rilatojn de la foiroj la iniciatintoj pripensis starigon de speciala Centro, kiu internacie prizorgus aferojn koncerne foiroj, kaj kiu cetere entreprenus ĉian varbadon kaj interrilatigon de tiuj, influus al solvado de transportaj-, pasportaj-, dogandemandoj k. s. Al la Centro apartenas kunmetado de internacia statistiko kaj havigo de informoj, kiuj estas en la interesosfero de la foiroj, kiel ankaŭ aranĝado de ĉiujaraj konferencoj, al kiuj ĉiu foiro sendu almenaŭ unu delegiton por diskuti la internacian laborprogramon kaj aliajn aktualajn demandojn. Estas supozite, ke tiu agado estu lokita en Zürich.

Supozante fondiĝon de „Internacia Foiro Asocio“, kies membroj estu nur la internaciaj



Plano de la Stacidomo en Helsinki. De Elia Saarinen.

foiroj, la Internaciaj Foiroj de Reichenberg proponas al la konferenco sekvantajn 6 punktojn:

1. Ĉiuj foiroj oficejoj, apartenantaj al ĉi tiu „Asocio“ unue devus fiksi siajn tempojn de okazigo, ke konkurado de foiroj geografe proksimaj unu al la alia estu malebla;

2. Ĉiu „asociiĝinta foira oficejo“ aŭtomate fariĝas informejo por ĉiuj asociiĝintaj foiroj. Por ĉi tiu celo estu interŝanĝota la tuta propagandilaro, kiel foiroj revuoj, katalogoj, aliĝoj por ekspoziciantoj kaj aĉetantoj, legitimiloj por vizitantoj k. t. p. En la oficialaj publikigoj de ĉiu foira oficejo estu menciata ĉi tiu organizo.

3. La asociiĝintaj foiroj oficejoj promesas devige, per ĉiujn oficialajn skribaĵojn (rekomendinte favore) de fremdlandaj asociiĝintaj foiroj, direktitaj al la propra registara estraro, kaj laŭ ebleco havigi jesan respondon.

4. La „asociiĝintaj oficejoj“ promesas devige reciproke, publikigi la plej gravajn sciigojn kiel tempo, avantaĝoj kaj plifaciligoj por vizitantoj kaj ekspoziciantoj pri la aliaj asociiĝintaj foiroj en la propra foira revuo (eventuale interŝanĝo de anoncoj).

5. Dum la foira semajno la informejo ĉiita en punkto 2. estas translokita en la foiran terenon.

6. Por ŝpari poŝtelspezojn, kiuj tre ŝarĝas ĉiun foiran buĝeton, estas proponate, ke ĉiuj asociiĝintaj foiroj sendu konformajn petskribaĵojn al la Universala Poŝta Unuiĝo, por ricevi internacian rabaton por la dissendado de siaj presaĵoj en eksterlandojn. Tielaj presaĵoj estus: foiroj revuoj, foiroj katalogoj, varbiloj por aĉetantoj, la ĉiutagaj korespondantoj, kiel ankaŭ paketoj kun propagandiloj. Por la lastaj estu petata de la diversaj registaroj nuligo de limdepago.

Samtempe la ĉiitaj Foiroj petas, ke la Konferenco ne nur pridiskutu la nurajn foirajn aferojn, sed ankaŭ prisdiskutu ĉiujn popolkunigantajn ekonomiajn interrilatojn.

Rekonante la noblan rolon, kiun la foiroj devas havi en rekomenco de ekonomiaj rilatoj internaciaj, oni esperas, ke la komuna laboro akcelu plejblan popularigon de la foiroj, ĉe kio la propagando kaj reklamo necesas por la foiroj fariĝu pli efika, des pli kredible, ĉar la koncernaj foiroj estos lamaniere devigataj akceli sukceson unu de la alia.

Tiel prezentante ĉi suprajn referatojn, kaj suban proponon de la direktoro de Finnlanda Foiro al la interesatoj, ni kuragaĵas peti la foirojn, kiuj ankoraŭ ne respondis al nia invito aŭ okaze ne estas

informitaj pri la okazigo de la Konferenco, bonvole esprimi sian opinion pri ĝi.

Helsingfors, la 25. majo 1922.

Por la direkto de Finnlanda Foiro  
Lauri Kuoppamäki.  
Konrad Ojala.

Esperanto en katalogoj de la foiroj.

Ĉar ĝis plus troviĝas foiroj, kiuj ne povas elspezi por eldono de speciala foira katalogo Esperanta, estus dezirinde, ke almenaŭ al la nomaro de komercaĵoj estu aldonita Esperanta traduko, por ke la aĉetolokoj en koncerna foiro per ĉi tiu troviĝu. En tiu senco mi kuragaĵas proponi aranĝon en la nuna katalogo de Finnlanda Foiro.

La katalogo de Finnlanda Foiro povas ĝis plus esti presita nur en la lingvoj finna kaj sveda. Tamen al la titolo de ĉiu vargrupo estas aldonita ankaŭ Esperanta traduko. Plue ĉiu vargrupo posedas sian propran numeron, kiu numero troviĝas en la alfabeto ordigita Esperanta listo de komercaĵoj. Tio ne plilgis la jam 200-paĝan katalogon per pli ol ĉ. 10 paĝoj, kio grandigas la elspezojn nur per ĉ. 5%

Lauri Kuoppamäki  
Direktoro de Finnlanda Foiro.

## Esperanto-Tagoj en Berlin.

(31-an de julio kaj 1-an de aŭgusto.)

La portoprenontoj de l' antaŭkongreso en Lübeck kaj de l' XIV-a Universala Kongreso de Esperanto en Helsinki havas okazon, kolektiĝi en la granda metropolo Berlin por kune veturi Hamburĝon.

Tial la Berlina Esperantistaro plej kore invitas la samideanojn venontajn el sudaj landoj (Ĉeĥoslovakio, Polujo, Aŭstrio, Hungarujo, Rumanujo, Bulgarujo, Jugoslavio, Italujo ktp.) restadi unu aŭ du tagojn en la interesa kaj vidinda urbejo Berlin.

Provizore ni donas la jenajn informojn:

Ni ĉiuj estis plenaj de intereso, kiam li eniris. La junulino levigis ĉesante triki. La ĉambro lumigis brilanta, felika rideto — ke ŝi, junulino, povis helpi fremdulon, beligi la mondon, — homon — viron!

La juna viro alproksimiĝis al la tablo. Jam etendiĝis mano, jam malleviĝis la broso. Ĉu okazis io alia, tion ni ne vidis — ni nur aŭdis lian dankantan voĉon tremetantan, kiel tremetas nur la voĉo de juna viro parolanta al juna fraŭlino.

Sed en la sama momento ni ekrimarkis, ke tamen okazis io alia. Kun terurita, preskaŭ senkonscia mieno la junulino ekrigardis la junan viron. „Ne... ne estas...“ ŝi balbutis — serĉis vortojn — konfuziĝis — reprenis la broson — pli kaj pli konfuziĝis — ekprenis rapide ion de sur la tablo, — en la kasa kesteto io ektilnis — kaj profunde super sia trikajo kliniĝis la junulino rugiĝinta ĝis la harrando.

Malfeliĉo estis okazinta, ĝi plenigis per sia pezo ĉiun angulon de la ĉambro. La juna viro staris pentoplena. La maljunulo balancis malaprobe la kapon. Sur la vizaĝoj de l' sinjorino oni vidis esprimon de bedaŭro. La tavastlandaj kamparanoj rigardis per serioza surprizo unuj la aliajn kaj nin, — ili verŝajne tute ne komprenis, kio okazis, nur tion, ke la rideto estis formortinta!

Silente, korpremite la juna viro iris al la pordo.

La rideto estas formortinta! kvazaŭ diris liaj paŝoj resonantaj sur la planko de l' ĉambro.

La rideto estas formortinta! ektondris peze la bastonpuŝoj de la maljunulo lamiranta post li.

La rideto estas formortinta! grumbis knare la dika, kverka pordo post miaj propraj malgajaj paŝoj.

El la finna lingvo tradukis  
Leo Jalava.

## La Rideto.

Skizo de Johannes Linnankoski.

Nenio en la vivo estas pli ĉarma ol la rideto de juna virino. Precipe la rideto de juna fraŭlino al juna viro. Ĝi entenas printempan pluvon kaj elburĝoniĝon de betulfolio, dum la suno brilas inter falantaj akvogutoj kaj dum la ĉielarko sep-kolora lumas sur la ĉielo.

Sed tiu rideto estas delikata kiel printempa floro. Bloveto el nordo aŭ oriento, kaj la floro refermiĝas.

Foje dum vojaĝo mi estis devigata atendi la vagonaron ĉe halstacio.

La stacio estis granda kaj multe vizitata, sed en tiu momento, dum la tempo de fojn-rikoltado, ĉi regis silento kiel en preĝejo.

Por pasigi la tempon mi eniris la triaklasan atendejon.

Tie sidis oficejo kun sia edzino, maljunulo, kelkaj kamparanoj, kaj sur benko tri mezaĝaj sinjorinoj; plej bufedistino malantaŭ sia tablo.

Mia atento koncentriĝis al la lastenomita, ĉar ŝi tute ne estis ordinara bufedistino, sed tre juna fraŭlino. Ŝiaj bukloj ne estis arte frizitaj, ŝia vizaĝo ne vidigis la kufiman, afekteman ridetadon aŭ indiferentan alrigardon. Ĉio estis juneca, freŝa kaj sincera, — ĉu ŝi trikis malantaŭ la tablo, aŭ modeste prezentis al mi tason.

Ni jam momenton sidis, eltrinkis la kafon kaj denove enprofundiĝis en silentan meditadon.

Jen malfermiĝis la pordo — eniris nova alvenanto.

Li jam ne estis junulo, sed juna viro li tamen povis esti nomata. Viro en ciklista kostumo, la

tuta estaĵo ankoraŭ plena je aero kaj vicleco, kvankam en la irado oni jam povis senti alproksimiĝon de pliaĝo.

Bravulo! ni certe ĉiuj pensis.

La alveninto ordigis sian kravatton, petis kafon de la fraŭlino kaj ĝin eltrinkinte sidigis en angulo. En la ĉambro refariĝis kiel en preĝejo.

Iom poste la juna viro releviĝis kaj momenton staris kvazaŭ hezitante antaŭ la fenestro; li rigardis siajn ŝuojn kaj ĝisgenuan pantalonon kun tiel evidentaĵa gesto, ke ĉiuj rimarkis, ke ili estas polvoplenaj, kaj ke tio lin ĝenas.

La juna viro aliris la bufedon.

„Ĉu vi, fraŭlino, ĉi tie eble havas broson?“ li demandis tiel mallaŭte, ke ni, la aliaj, apenaŭ tion aŭdis.

„Mi ne havas“, respondis la junulino. „Sed“ — ŝia rigardo zorgeme ekzamenante direktiĝis al la pantalone kaj ŝuoj de l' demandinto — „en la alia ĉambro vi trovos broson.“

Ŝi tie finis sian penson kaj kvazaŭ esplorante rigardis la okulojn de l' junulo.

Li ŝajnis nedecidema. „Ĉu eble vi bonvolus...?“ li komencis hezitante.

„Jes — mi tuj alportos ĝin!“ ekrapidis la junulino, kaj sur ŝia vizaĝo aperis helpema, amika ekrideto, kiun ni viroj tiel bone konas.

La juna viro atendis en preskaŭ senpacienca sintenado. Eĉ ni aliaj fariĝis scivolaj, kvazaŭ ni estus aŭdintaj la unuajn vortojn de interesa fabelo: estis foje junulo kaj junulino...

La junulino forestis momenton kaj revenis. Ŝi alvenis per malpezaj paŝoj kaj sur ŝia vizaĝo brilis juna, senĝena goĵo pro tio, ke ŝi povis helpi kaj servi.

Nun ŝi etendas al li la broson. Kaj jen ni vidis ĝin, — la rideton de juna fraŭlino. Ĝin, kiu similas al rosoreŝa, printempa mateno, sed

kiu tamen jam entenas ĉion, kio en virino estas: amikino, koleginino, amantino, patrino, sed ĉiokaze nia kuno lino, ĉu ni jetos nin en akvajn profundajn aĵojn aŭ ĉu ni paŝos la ruĝan vojdon de l' revolverpaŝoj.

Tiu momenta rideto eklumigis la tutan ĉambro. La juna viro iris per vigla, triumfantaj paŝoj al la ĉekorta ŝtuparo. La maljunulo ridetis la junecan rideton el antaŭ jardekoj. Inter la sinjorinoj ekfariĝis vigla paroleto, eĉ sur la rigidaj vizaĝoj de la silentemaj tavastlandaj kamparanoj aperis bonvola, agrabla grimaco. Nur la oficejo kun sia edzino restis seninteresa\*\*).

Niaj rigardoj instinkte direktiĝis al la ŝtuparo. Tie la broso goĵe svingiĝis en la mano de l' juna viro.

Baldaŭ ĉio estis en ordo. Kun kontenta rideto sur la lipoj la juna viro ekrigardis siajn senpolvigitajn vestojn kaj repoluriantajn ŝuojn.

Sed — jen lia vizaĝo ekmontris hezitantan trajton — ni vidis lian manon malrapide ŝovigantan en la poŝon por elpreni la monujon kaj daŭre restantan en la poŝo; sur la vizaĝo estis nedecidema mieno.

Ni vidis kvazaŭ tra diafana akvo en la fundajn motivojn de la ŝanceliĝo. Ĉu mi povos doni trinkmonon al virino, kiu tiel ridetas? Sed estas kutimo, — ĉu mi povos ne doni?

Liaj doloraj sentoj ekkaptis nin, la aliajn. Sed — jen sur lia propra vizaĝo ekaperis trankvila mieno de kontenteco — kvazaŭ li estus ek-trovinta la ĝustan solvon. Li malfermis la monujon kaj elprenis arĝentan moneron.

\* Tavastlando, finne Häme: provinco en meza Finnlando. La ĉefaj trajtoj en la naturo de la tavastlandaj popolo estas malrapideco kaj silentemo.

\*\* La oficejo certe estis en la rusa tempo, do fremda al la popolo, ne komprenanta ĝiajn lingvon kaj morojn. Rim. de la trad.



1. London, la 31. julio okazos:  
antaŭtagmeze: gvidado tra Berlin,  
posttagmeze: ekskurso per vaporŝipo al Pots-  
dam (kasteloj kaj parko de Sanssouci),  
vespere: gaja babilvespero en koncertgardeno.

2. Mardon, la 1. aŭgusto:  
antaŭtagmeze: gvidado tra Berlin kaj antaŭ-  
urboj,  
posttagmeze: vizito al granda magazeno kaj  
kaftrinkado en ĝardeno,  
vespere: komuna manĝo kun oficiala akcepto  
de Berlinaĵ jurnallisto.

3. Merkredon, la 2. aŭgusto:  
matene: forveturo al Hamburg kaj Lübeck.  
La Berlina samideano ĉion bone organizos  
kaj zorgos pri loĝado en hoteloj ktp.  
Bonvolu do atenti la jenajn poŝtojn:  
a) Sendu vian skriban aliĝon al  
„Esperanto-Verband Berlin“, per adreso de  
s-o Joh. Schwaiger, Berlin-Steglitz, Zimmer-  
mannstr. 6.  
(Ne forgesu aldoni al via letero internacian  
respondkuponon!)

b) Antaŭsendu al la sama adreso la sumon  
de 100,— markoj germanaj (en „rekomen-  
dita letero, ĉeko de germana banko, naciaj  
aŭ germanaj monbiletoj).  
Ĉi tiu antaŭpago estas necesa, por ebligi  
la preparadon de loĝigo, gvidado, ekskurso,  
manĝoj ktp. kaj estas enkalkulata en la tutaj  
kostoj. Komprenibile ni provos aranĝi ĉion  
komforte kaj plejeble malkare.

c) Anoncu vian partoprenon plej malfrue ĝis  
la 22-a de julio kaj skribu sufiĉe frue, kiam  
precize vi alvenos.

E. W.

## Al la Esperantista laboristaro.

Kiel vi eble jam scias, okazos la XIV-a Uni-  
versala Kongreso de Esperanto en Helsinko,  
Finnlando, la 8.—16. aŭgusto venonta. Vi ankaŭ  
certe komprenas la grandegan signifon de komuna  
komprenilo, — kia estas lingvo internacia —, por  
la laborista movado tutmonda, kaj, ke do venko  
de Esperanto inter laboristaro estas nia plej  
necesa kaj proksima celo.

Laborista Esp. Societo „Unueco“ en Helsinko  
kaj Laborista Kleriga Asocio de Finnlando decidis  
kune aranĝi fakan kunvenon de laboristoj dum  
la XIV-a. Krom la ordinara fakaj kunsidoj okazos  
ankaŭ solena festo kun programo internacia.

Ni admonas ĉiujn Esp. grupojn laboristajn kaj  
izolajn laboristojn sendi reprezentantojn al la kong-  
reso kaj ĉeesti la fakajn kunsidojn de laboristoj,  
por diskuti kaj prilakti nian komunan aferon, —  
propagandon de Esperanto inter la laboristaro  
tutmonda —, kio estas nuntempe la sola reala  
programo de Esp. laboristoj.

Ni aparte ni proponas diskuton pri sekvontaj  
demandoj:

1. Organizado de propaganda laboro komuna  
inter la laboristaro tutmonda;
  2. metodoj komunaj de la propagando;
  3. kreado de informservo internacia;
  4. kongresoj de Esp. laboristoj.
- Proponojn pri diskutotaj kaj prilaktotaj aferoj  
bonvolu sendi al k-do V. J. Kostialainen je la adreso  
Helsinki, Vaasankatu 3. D. 95.

## Karavano de UEA

Lyon—Strasburgo—Helsinki—Strasburgo—  
Lyon.

Resuma programo.

1. Lyon—Helsinki.  
Merk., 2. aŭg. 19.55 h. el Lyon  
Ĵaŭdon, 3. „ 8 h. el Strasburgo


14.32 h. al Frankfurt  
Vendr., 4. aŭg. 22.07 h. el „  
Sabaton, 5. „ 9.21 h. al Lübeck  
„ 14 h. el „  
Mardon, 8. aŭg. frumatene al Helsinki  
Vizito de Frankfurt kaj Lübeck.

2. Helsinki—Lyon.  
Sabaton, 19. aŭg. el Helsinki  
Lundon, 21. aŭg. al Lübeck  
el Lübeck  
Mardon, 22. aŭg. 7.50 h. al Köln  
Merk., 23. aŭg. 7.04 h. el Köln  
10.03 h. al Mainz

Kondiĉoj.  
Esti Membro-Abonanto de UEA, aliĝi al la  
Kongreso, havi pasporton kun ĉiuj necesaj vizoj;  
aliĝi tuj al la Karavano sendante garantian sumon  
da 200 fr. fk. Oni povas aliĝi aparte por la iro  
aŭ por la reveno de aŭ al Lyon aŭ Strasburgo.

Pasporto.  
Zorgu jam nun pri ĝi kaj petu germanan kaj  
finnlandan vizojn.

Avertoj.  
La Karavano okazos nur, se ni estos ricevintaj  
almenaŭ 12 aliĝojn. Ni respondos nur al leteroj



El la Antaŭkongresurbo Lübeck. — Internajo de Marien-Preĝejo.

Ĵaŭdon, 24. aŭg. 4.55 h. el Mainz  
10.11 h. al Strasburgo  
12.40 h. el Strasburgo  
23.06 h. al Lyon.

Vizito de Köln kaj Mainz, eble eĉ de Hamburg  
kaj Strasburgo.

Se la LKK sukcesos luigi specialan ŝipon, kiu  
forveturos el Helsinko jam merkredon, 16. aŭg.,  
ni revenos en Lyon jam lundon, 21. aŭg.

Prezoi.

Laŭ hodiaŭaj prezoi kaj kurzoj ni povas certigi,  
ke: La vojaĝo Lyon—Helsinki certe ne kostos  
pli ol 350 fr. fk.; la vojaĝo Helsinki—Lyon certe  
ne kostos pli ol 400 fr. fk., laŭ nia programo:  
fervo o en 3-a kl. en Francando, en 2-a kl. en  
Germanlando, ŝipo en 1-a kl., hoteloj, restoracioj,  
manĝovagonoj, trinkmonoj, tramveturadoj, eniroj  
en muzeojn, k. a. Altparte vivo en Helsinko ne  
kostas 25 fr. fk. ĉiutage. Vi do povas fidi, ke, eĉ  
se ni devos atendi en Finnlando ĝis sabato, 19.  
aŭg., vi entute certe ne elspezos 1 000 fr. fk.

enhavantaj du resp.-kup. aŭ sufiĉajn francajn poŝt-  
markojn.

Adresu ĉiun korespondanton al s-o Poncet, 30  
rue Ferrandière, Lyon. (Atentu pri tiu nova adreso!)

M. Génemont, L. Poncet,  
Komitatano de UEA (Moulines), Vicĉefdel. UEA (Lyon).

## D-ro Privat en Liverpool.

Profitante de la ĉeesto de D-ro Privat en  
London, la Liverpoolaj samideanoj kaptis la  
oportunon transkonduki lin al sia urbo. La  
vizito estis pli sukcesa ol oni antaŭe atendis.  
Por interesiĝi en nia movado la anojn de la loka  
Unuiĝo por Ligo de Nacioj kaj ankaŭ la Uni-  
versitatojn, publika kunveno estis aranĝita  
la 6. julio vespere en la Universitato, sub la  
aŭspicio de Unuiĝo por Ligo de Nacioj kaj la  
Liverpoola Grupo Esperantista. Prezidis la  
kunvenon Prof. W. E. Collinson, kiu per trafaj  
kaj kleraj vortoj rakontis pri la signifplena  
Internacia Konferenco, kiu okazis en Genevo pri

Esperanto en lernejoj kaj kiun li mem ĉeestis  
kiel delegito de la Lancashire kaj Cheshire  
Federacio Esperantista. Tiu malferma parolado  
de la prezidanto tuj ekkaptis la intereson de la  
neesperantista ĉeestantaro, kiu avide atendis  
la ĉefan paroladiston. Ilia antcipio certe ne  
estis vana, kiam D-ro Privat sidigis post 70-minuta  
flua parolado. Lian senkomparan elokventecon  
en la Esperanta lingvo li eĉ superis ĉi tiun fojon  
en la angla lingvo, de kiu li estas egala majstro.

Per bonegaj argumentoj kaj konvinkaj frazoj,  
li montris la neceson de Esperanto por tiu  
nova postmilita organizo Ligo de Nacioj, kaj ĝian  
eminentan taŭgecon por mondlingva celo.  
La kunvenon ĉeestis kelkaj profesoroj de la  
Universitato, inter ili prof. Webster, entuziasma  
subtenanto de la Ligo de Nacioj. Estas interese  
citi la eldiraĵojn de prof. Webster, kiu proponante  
voĉdankon al D-ro Privat diris interalie: ke li  
venis al la kunveno kiel skeptikulo, sed forlas-  
tute konvinkita pri la taŭgeco de Esperanto kiel  
helpa mondlingvo ĝenerale kaj kiel ilo por la  
Ligo aparte. Li promesis helpi la movadon ĉe  
la anglaj rondoj de la Ligo de Nacioj kaj ankaŭ  
subteni nin en aliaj direktoj.

Tio ne finis ankoraŭ la utilecon de la vizito:  
merkredon matene D-ro Privat kun Prof. Collinson  
faris viziton al la Direktoro de Edukado, kie ili  
faris bonegan impreson kaj ricevis kuraĝigajn  
promesojn rilate al Esperanto en lernejoj. Oni  
daŭrigis la bonan laboron de propagando ĉe lundo  
en la Universitata klubo, kiam D-ro Legge, eks-  
direktoro de Edukado, kaj aliaj profesoroj kun-  
lunĉis, kaj posttagmeze D-ro Privat vizitis la lern-  
ejon, kie li ekzamenis la knabojn, kiuj lernas  
Esperanton.

La direktoro de Edukado petis raporton de  
D-ro Privat pri tiu vizito. Lokaj jurnaloj bonege  
raportis pri la poresperanta agado de D-ro Privat  
en la urbo, kaj ni esperas bonajn rezultojn el tiu  
vizito. Ni ŝuldas multajn dankojn al Prof. Collinson  
kaj Prof. Webster por ilia helpo kaj morala sub-  
teno de nia afero. J. D. Applebaum.

## Postkongresa Vizito en Stockholm.

(18.—19. aŭgusto).

Tuj post la Universala Kongreso de Esper-  
anto en Helsinko la svedaj Esperantistoj aranĝos  
viziton al Stockholm.

Por la trapasontaj samideanoj ni intencas  
aranĝi:

1. Esperanto-Oficejon en Hotelo Continental  
ĉe la ĉefstacidomo. Tie oni ricevos klarigojn pri  
vojaĝoj ktp. antaŭ kaj post la kongreso de Helsinko.
2. Rabatotajn prezojn en Hotelo Continental:  
ĉambro unullita svkr. 5.— kaj pli, dullita svkr. 9.—  
kaj pli; matenmanĝo de svkr. 2.50 kaj tagmanĝo  
de svkr. 4.— Ĉio kun rabato de 10%.

3. Vizitan programon:  
La 18. aŭg.:  
10 h. atm. Trarigardi la urbon, eventuale en  
specialaj grupoj.

7 h. pm. Publika propaganda festo.  
9 pm. Komuna vespermanĝo kun amuzajoj.

La 19. aŭg.:  
10 atm. Marekskurso ĉirkaŭ la urbo.  
Vizito al la liberaera muzeo Skansen  
kun tiea komuna tagmanĝo.

4. Eventualajn ekskursojn pli longajn al histo-  
riaj kaj naturaj vidindaĵoj.

Nenta certa kottizo. Ĉiu pagu por si mem.  
Ni tamen deziras sciiĝi pri la venontoj por aranĝi  
loĝejon ktp.

Por la Stockholma Komitato:  
Leander Tell,  
Prästgårdsgatan 42, Stockholm Sö.

## Lumo!

Legendo de D. Frišman.

Rimarkigo de l' tradukinto: Oni ofte  
intermiksas la komprenojn „ludo“ kaj „he-  
breo“. Rilatale al persono tio estas egala, sed  
rilate al la literaturo estas diferenco. La judoj  
havas du lingvojn kaj du literaturojn. La juda  
samo kiel la hebrea literaturo estas preskaŭ  
de neniu altingvanta konata, kvankam tiuj  
literaturoj enhavas trezorin, kiujn oni devas  
malfermi kaj montri al ĉiuj literatur-amarantoj.  
Dank' al Esperanto oni povas tion atingi. La  
jena legendo „Lumo“ estas tradukita el la  
hebrea lingvo.

Nokto. Densa nubo de mallumo plenplenigas  
la dormoĉambro de unu flanko ĝis la alia.  
En lulilo kuŝas dormanta infano, kaj en apuda  
lito kuŝas lia patrino kaj ankaŭ dormas.

Subite la infano ekmoviĝis, malfermis la okul-  
etojn kaj vekigis.

„Patrinjo!“  
Kaj ankaŭ la patrino vekigis.

„Kion vi deziras, mia amata infaneto?“  
„Lumon! Lumon mi deziras, patrinjo! Estu lumo,  
patrinjo! Mi deziras, ke ĉiulumamente estu lumo!“

La patrino rapide ekleviĝis, ellitiĝis kaj bruligis  
kandelon.

„Ne, patrinjo! Ne kandelon mi deziras, ne lumon  
de kandelono, ne tian! Estu lumo! Mi deziras, ke sur  
la tuta tero estu lumo! Mia deziro estas, ke ekstere  
kaj ĉie estu lumo, ke nun fariĝu tago, mi deziras!“

„Sed, ho mia animeto! Tio, kion vi deziras, ne  
estas efektivebla. Nun estas nokto, kaj ne ekzistas  
homo sur la tuta terglobo, kiu havus povon ŝanĝi  
la nokton je tago. Tion eĉ tutkore amanta patrino  
ne povas fari por sia sola filo! Atendu, atendu  
lomete, mia karulo! Estu pacienca lomete, mia  
animeto! Baldaŭ, tre baldaŭ tagiĝos.“

„Sed mi deziras, ke nun estu tago! Mi deziras,  
ke ĉiam estu tago!“

Kaj la infano ekploras.

La patrino suferas aŭdante la voĉon de sia  
ploranta infano; la vokon de l' morto frapanta per  
flugiloj ŝi kun plezuro aŭdus, sed neniam — la  
ploranta voĉon de sia infano. Kaj la infano daŭre  
ploras.

Li pli kaj pli maturiĝas, kaj ju pli li maturiĝas,  
des pli li serĉas lumon kaj tagon, kaj ju pli li serĉas  
lumon kaj tagon, des pli li ploras. Kaj lia patrino,  
aŭdante la ploradon, pli kaj pli malgrasiĝas, ĉar  
ŝi suferis pro la ĝemado de sia infano.

Ho, Dio de Lumo! Ĉion ŝi estas preta oferedoni,  
por ke fariĝu lumo al ŝia filo.

Kaj ŝi iris serĉi lumon por sia filo.

„Kie estas la loko, de kie estas prenata la  
lumo?“

Kaj kiam ŝi estas staranta ĉe la vojkruciĝo  
kaj serĉanta la ĝustan vojon, jen renkonte al ŝi  
venas maljunulino.

„Mi maljunigis, kaj la multaj travivitaj jaroj  
saĝigis min. La lumon vi serĉas, mia filino? La lumon  
por via filo? Aŭskultu, mia filino, kion mi diros al vi:  
se vi prenos viajn brilantajn kaj lumantajn okulojn  
kaj oferedonos ilin por via filo, li havos lumon, kiam  
li deziras.“

La patrino ne hezitis eĉ unu minuton — ŝi leviĝis  
kaj oferedonis siajn brilantajn kaj lumantajn okulojn  
por la filo. Tago kaj nokte, tage kaj nokte ŝi labor-  
adis por sia infano, neniam haltigante la laboradon,  
ĝis kiam ŝi blindiĝis pro multa dumnokta laborado.

Sed tiu lumo estis nur lumo sole por ŝia filo —  
kaj li, li ja deziris, ke al la tuta mondo ĉirkaŭe  
estu lumo.

Kaj duan fojon starigis la patrino ĉe la voj-  
kruciĝo kaj demandas:

„Kie estas la loko, de kie estas prenata la  
lumo?“

Kaj jen antaŭ ŝi maljunulino.

„Nun mi maljunigis, sed iam mi estis same  
juna kiel vi. Kaj en mia junaĝo ankaŭ mi estis  
patrino kiel vi; tial mi multon scias. Se vi pen-  
laboros, ĝis kiam la noktonigraj haroj de via kapo  
blankiĝos kiel la tago, tiam el tiu blankeco eliĝos  
lumo, kion vi havos por via filo.“

Kaj la amanta patrino ne ŝanceliĝis eĉ unu  
sekundon. Ŝi komencis laboradi por la filo, tage  
kaj nokte ŝi laboradis, tage kaj nokte, ne ripoz-  
ante, ĝis kiam pro multe da laborado blankiĝis  
ŝiaj nigraj haroj. Kaj tiu blanko estis kiel la blank-  
eco de safiro, kaj sendis sian lumon malproksimen  
ĝis distanco de sepdek sep mejloj.

Sed ankaŭ tiu lumo ne sufiĉis; ĝi ne estis mond-  
lumo, kaj ne lumis al la tuta tero.

Kaj la trian fojon staras la patrino kaj demandas:  
„Kie estas la loko, de kie estas prenata la  
lumo?“

Kaj venis spirito, kiu diris:  
„Se vi oferedonos la ruĝan sangon de via koro  
por la filo, tiu ruĝo estos grandega lumo, kiel la  
lumo en la sep tagoj!“

„La sangon de mia koro?“ diris la patrino —  
kaj ne pensante je si mem, ŝi disŝiris sian koron  
kaj ĝin oferis por la filo. Kaj la patrino koro  
oferita por la filo trege varmigiĝis, kaj tiu varm-  
ego similis la varmon de la suno en Gibeon<sup>2)</sup>,  
kaj lumis unu tagon kaj nokton, lumis pliajn sep  
tagojn kaj fariĝis lumo al la infano.

Sed eĉ tiu lumo ne estis mondlumo, kiu lumu  
por la tuta mondo ĉirkaŭe, kaj kiu lumu eterne  
kaj ne ĉesu.

Kaj la patrino ree vagiras kaj pet-demandadas:  
„Kie estas lumo? Kie estas lumo? Diru al mi,

<sup>1)</sup> Laŭ juda legendo en la sep tagoj, dum kiuj Dio estis  
kreanta la mondon, la suno lumis sepoble pli intense ol nun.

<sup>2)</sup> Gibeon — tie laŭ biblia rakonto Josuo haltigis la sunon  
kaj lunon.

kie estas la lumo, kiu lumadu al mia filo konstante  
kaj ankaŭ al la tuta tero pro li.“

Kaj jen antaŭ ŝi maljunulo.

„Se vi kolektas ĉiujn librojn de la mondo kaj  
ĉian sciencan kaj saĝon, vi havos la lumon, kiu  
vi serĉadas por la filo.“

La patrino kolektadas por sia filo ĉiujn librojn  
de l' mondo, kaj ĉiujn saĝulojn kaj sciencistojn ŝi  
kunvokas, por ke ili donu al li ĉian saĝon kaj sciencon.

Kaj la saĝuloj kaj sciencistoj donas al la filo  
saĝon kaj sciencon, kaj al li estis lumo, tre granda  
lumo. Sed — elrigardinte eksteren unu minuton,  
li ekvidis, ke grandega mallumo regas ĉirkaŭe kaj  
ke sole li havas lumon; do tio doloris lin sepoble.

La knabo estiĝis junulo, kaj la junulo plen-  
kreska homo, kaj tiu homo estis tre malfeliĉa.

Ĉar ne trovas trankvilon kaj pacon homo, kiu  
ĉiam serĉadas lumon, unu lumon por la tuta  
homaro.

Dum li estis serĉanta lumon, pasis for tagoj  
post tagoj, jaroj post jaroj, kaj li laciĝis, maljun-  
iĝis, kaj lia frunto sulkiĝis.

Liaj piedoj doloras lin pro multa irado kaj  
serĉado, kaj lia koro — pro multa pensado kaj  
esplorado.

Liaj nigraj haroj blankiĝis, kaj ili brilis kaj  
lumis.


Li havis flon, kaj ankaŭ lia filo deziras de li  
tion, kion li estis dezirinta kaj serĉinta dum sia  
tuta vivo.

Kaj dume pli kaj pli proksimiĝis lia lasta kaj  
malfacila tago.

Kaj anstataŭ la lumo, venis anĝelo malluma  
kun mil nigraj okuloj.

Subite li ekkomprenis: tio estas naturleĝo!  
Venas kaj foriĝas: tago kaj nokto, vintro kaj somero,  
lumo kaj mallumo, varmo kaj malvarmo.





Lübeck. — Holstentor (Holstejna Pordego).

## Komerco.

Fairoj kaj Ekspozicioj dum julio.

- 1.—24. London. Ekspozicio aernaŭtika.
- 3.—14. London. Foiro.
- 3.—9. Göteborg. IV-a Sveda Foiro.
- 7.—15. Bratislava-Pressburg-Pozsony. II-a Internacia Orienta Foiro.
- 11.—25. Genève. Nacia foiro de horloĝ-industrio kaj bijuterio.

Internaciaj konferencoj de foiroj.

Sekve de la inicio de la foiro de Helsinki (vidu paĝon 1 de tiu ĉi numero), la foiroficejo de Reichenberg ellaboris detalan raporton. Dum la XI-a Germana Esp. Kongreso en Breslau okazis konferenco de reprezentantoj de diversaj germanaj ĉeĥoslovakaj kaj aŭstraj foiroj; dum ĝi oni deklaris unuanime la raporton de Reichenberg kiel speciale taŭgan bazon por pluaj traktadoj, multobligis kaj disponigis ĝin al la diversaj folrestraroj.

Francujo.

La Pariza Komerca Ĉambro presigis, kiel oficialan dokumenton, la raporton. Ĝin s-o Baudet, delegito de la Komerca Ĉambro en la Geneva Konferenco, prezentis al ĝi la 25. aprilo. La 15. junio s-o Baudet faris en la granda amfiteatro de la Lernejo de Altaj Komercaj Studoj (Ecole des hautes études commerciales) paroladon pri Esperanto antaŭ lernantoj de la lernejo kaj 30 reprezentantoj de la komerca kaj industria mondo, invitataj de l' administraco de la lernejo. Inter la ĉeestantoj estis s-o Burnier, direktoro de la lernejo, kaj s-o Bellin, membro de la Kom. Ĉambro kaj prezidento de la administra konsilantaro de la lernejo.

La Kom. Ĉambro de Avignon decidis starigi publikan kurson de Esperanto en 1922-23.

## Breslau'a Kongreso.

Alplenigaĵo.

Kongresajojn, ĝis nun ne postultajn, mi alsendos post pago de 6.—mk. por elspezoj (poŝtĉekkonto 36 360 Breslau, Alfred Hanuschke). En mia loĝejo oni povas ricevi ilin sen alpagi. Tempolimo: 31. 8. 22.

Grupbildoj de la kongresanoj liveros afrankite la firmo „Gebr. Barasch, Phot. Abt., Breslau 1“ post alsendo de 40 mk. al la poŝtĉekkonto Breslau 528, Hanuschke, Hedwigstr. 11.

Kaj vokinte sian filon al la mortlito, li ekparolis: „Jen, vidu, dum mia tuta vivo mi serĉadis lumon, kaj tio sufiĉas al mi, ĉar kiu serĉas lumon, al tiu fariĝas lumoj!“

El hebrea lingvo tradukis  
J. Jurysta.

## Nekrologo.

Post grava malsano mortis nia samideano

S-o F. Stock,

posedanto de la firma F. Stock & K-jo en Solingen-Ohligs (Germ.). De multaj jaroj ano de la loka Esp. grupo li energie laboris por nia afero. Praktike li helpis la movadon uzante Esperanton en eksterlanda korespondado kaj eldoninte adresaron de l' industrio de Solingen en diversaj lingvoj kaj Esperanto.

La Esperantistaro konservas al li honorigan memoron.

Fariĝu

Dumviva Abonanto

pagante sesoblan jarabonon!

(Legu la tre favorajn kondiĉojn en n-o 90.)

## Hebreoj.

II-a Komunikado de TEHA  
(Tutmonda Esperantista Hebrea Asocio).

Karaj samideanoj hebreaj!

Jam la unua komunikado informis vin pri la unuaj aliĝintoj, da kiuj — kiel oni komprenas — estis tiam nemulte (Vidu ET n-o 85). Nun, kun ĝojo ni povas komuniki la nomojn de multaj plue aliĝintaj samideanoj, kiuj estas petataj pardoni nin, ke ni ne povas al ili persone respondi.

Pollando: Aš, Brukarz, D-ro Gelibter, Glicenštajn, Haberfeld, Kvejtman, Lejzerowicz, Levenštajn, Luidor, E. kaj R. Mizes, Nagel, Sapiro, Šatau, Šeps, A. kaj M. Štajnberg kaj 19 geanoj de Krakova sekcio.

Aliaj landoj: Applebaum (Brit.), Buras (Est.), L. kaj N. Con'argi, Ghitman, L. kaj M. Palschi, Rabinovici (Rumanio), Dembovitz (Franc.), Schatz (Latvio), Ĝinz, Weisskopf (Ĉeĥ.), Abramoviĉ (Ukrainio).

Okaze de la I-a Tutpolia Esperanta Kongreso la 5. 6. estis aranĝata kunsido de la Teha-anoj. Prezidis D-o Gellbier. La kunsido donis al ni novan pruvon, ke ekzistas inter niaj samideanaj fratoj forta volo al fina fondo de la Asocio. La lasta estas farota dum la XIV-a Kongreso en Helsinki. Ĉiuj Teha-anoj tute certe vizitontaj la Dekkvaran estas petataj:

1. Skribi al ni (la adreso: T. E. H. A. ĉe „Societo Esperanto“, Kraków, Pollando, Stawkoszka 6.
2. Anonci al Kongresa Komitato la deziron, partopreni en la t. n. faka kunsido de hebrea Esperantistoj. La provizora sekretario prezentos al la nomita kunsido la koncernajn materialojn per aparta multobligita cirkulero, al ĉiuj aliĝintaj Asocioj antaŭkonigota. Laŭ peto de multaj, en ĝi troviĝos ankaŭ kompleta adresaro de la ĝisnunaj aliĝintoj.

Fine: Kelkaj altvalutaj Asocioj trege helpus al la sekretario per iomete da spezoj.

Leopold Dreher  
prov. hon. sekr. de T. E. H. A.

## Laboristaro.

7-a Jarkunveno de Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj

okazos en Haarlem, dimanĉo, la 10. julio, en konstruaĵo „Nijverheid“, Jansstraat 85, matene je 10 h. Ĉiuj Esperantistoj estas invitataj ĉeesti tiun ĉi publikan kongreson, kiu kiel dum antaŭaj jaroj tute okazos en Esperanto.

El la detala jarraporto de la sekretario ni citas la jenon:

Dum la „Verda Semajno“ (varba semajno por Esperanto inter la laboristoj) okazis en kelkaj urboj pli-malpli sukcesintaj kunvenoj. Bedaŭrinde la Verda Semajno okazis nur en decembro. Malgraŭ la neopertuna tempo kelkaj centoj da aŭstaj estis algluataj. Plue la Ned. Lab. Esp. Servo dum tiu semajno sendis al la redakcio de ĉiuj laboristaj kaj socialistaj gazetoj cirkuleron pri la signifo de Esperanto por la laborista klaso.

Samtempe aperis broŝuro nederlandlingva: „Esperanto kaj la Laborista Movado“ (de s-o Klock), kiu baldaŭ estis elĉerpita (1 000 ekz.).

Ĝenerale ni povis konstati malgrandan ek-interesiĝon ĉe kelkaj meti-centraloj invitataj de ni por kunlaboro. Dum tiu ĉi jaro ni certe havos pli da sukcesoj. —

Okaze de la I-a de majo ni eldonis flugfolion: „Een brug tussen de Volkeren“ (Ponto inter la popoloj) en 10 000 ekzempleroj.

Nia prezidanto s-o Faulhaber vizitis la kunvenon de la SAT-anoj en Praha, kiu okazis samtempe kun la XIII-a. Bedaŭrinde li ne trovis tie reprezentanton de la GLEA-estraro, la nura, kiu iomete samopinias kun ni pri fondota Internacio de Laboristaj Esperantistoj. Ni konatiĝis pri la fakto, ke ankaŭ la GLEA-estraro ne troviĝis je la antaŭkongreso de la laboristaj Esperantistoj en Dresden, kie ankaŭ SAT ludis la ĉefrolon. Ĉar nia Federacio estas pure propaganda ligo por Esperanto kaj rilatas al politiko kaj religio tute neŭtrale, ni ne povis iamanlere kuniĝi kun la SAT-anoj, kiuj cetere ne kunvenis por fondi Internacion de Lab. Esperantistoj, sed havis jam preta tutan Internacion, al kiu oni povas „libere aliĝi“.

En la pasinta jaro ni perdis unu sekcion, 2 societoj aliĝis al la Federacio. Ni nun havas 10 sekciojn kun 164 membroj.

Krom multaj grandaj pakajoj dum la „Verda Semajno“ kaj la 1. majo ni forsendis de 1. junio 1921 ĝis 1. junio 1922: 103 leterojn, 197 poŝtkartojn kaj 277 presitaĵojn.

Francujo.

En Troyes la francaj revoluciemaj Esperantistoj kunvenis la 4. kaj 5. junio, okaze de la Dua Kongreso de sia Federacio. La delegitoj estis akceptataj de la Esp. laborista grupo de la urbo. Komunista deputato kaj reprezentantoj de la sindikatoj kaj de la Respublika Asocio de Eksbatalantoj ĉeestis la kunvenon, kiu okazis en la Laborborso. La organizado de la Federacio kaj la propagando en la laboristaj rondoj estis pritraktataj. Jam la Federacio sukcese eldonis lernolibron por laboristoj kaj publikigis baldaŭ broŝurojn. La sidejo de la Federacio estas nun en Troyes, kaj la proksima kongreso okazos en Le Havre.

## Tekniko.

Al Ĉiulandaj Teknikistoj  
(Inĝenieroj kaj Arkitektoj).

En la maja kunveno de la tutlanda Societo de Finnaj Teknikistoj (Suomalaisten Teknikkojen Seura), la plej granda Finnlanda organizacio de teknikistoj (inĝenieroj kaj arkitektoj) estis interalie diskutata la demando pri la XIV-a Kongreso de Esperanto pro tio, ke inter la kongresanoj verŝajne

alvenos ankaŭ multaj eksterlandaj teknikistoj. Laŭ propono de staj Esperantistoj membroj la societo tial decidis kunvoki specialan Internacian fak-kunvenon de inĝenieroj dum la XIV-a por diskuti komunajn aferojn, kiuj interesas niajn kolegojn en la tuta mondo.

La Societo de Finnaj Teknikistoj do jene invitis ĉiulandajn teknikistojn (inĝenierojn kaj arkitektojn) multnombro alveni al la XIV-a kaj partopreni en la faka kunveno de inĝenieroj.

Por interkonatiĝo estos rezervita tempo marde la 8. aŭgusto je 9 h. matene. La kunveno mem okazos sabate la 12. aŭg. je 12—5 h. pm. Dum la sama tago antaŭtagmeze oni verŝajne aranĝos teknikajn ekskursojn por tiuj teknikistoj, kiuj ne partoprenos en la kunveno de UEA, kaj, se bezone, ankaŭ posttagmeze laŭ interkonsento kaj deziro de eksterlandaj kolegoj kaj laŭ tio, al kiaj fakoj la ekskursoj plejparte apartenas.

Ĉiujn demandojn koncerne la fakajn kunvenon, proponojn pri diskutemandoj, aliĝojn ktp. oni sendu al inĝeniero Sulo Attila, Helsinki, Hakaniemiranta 4, A, Finnlando.

P. S. Ni petas, ke ĉiuj Esperantaj gazetoj en la tuta mondo bonvolu represii la supran inviton sen aparta alsendo de manuskripto.

## Kooperativo.

Esperanto ĉe Kooperativa Societo en Liverpool.

Grandan intereson vekis s-anoj Jones kaj Griffiths por Esperanto ĉe la kooperativaj gildoj dum la pasinta vintro-sezono, kaj kiel sekvo komencis nun (14. majo) du kursoj por kooperativanoj. Unu je la norda kvartalo estas gvidata de s-o Griffiths kaj partoprenas ĝin ĉ. 25 personoj, alia je la suda kvartalo gvidata de s-o Jones, ĉ. 30 personoj.

## Libera Penso.

Internacia Esperanta Ligo de Liberpensuloj kaj Monistoj.

Dum la XI-a Germana Esp. Kongreso estas fondita de monistoj nova unuigo sub la nomo „Internacia Esperanta Ligo de Liberpensuloj kaj Monistoj“. Ĝi celas kunigi la koncernajn samideanojn, disvastigi Esperanton inter liberpensulaj kaj monistaj rondoj, aranĝi apartajn kunidojn je diversaj naciaj kaj internaciaj kongresoj, eldoni liberpensan gazeton. La Ligo estas neŭtrala rilate al nacleco kaj politiko. La sidejo troviĝas en Leipzig (Germanujo). Kofizo 1922 por germanoj 5 gmk., por eksterlandanoj 10 gmk. — Adreso: Kurt Hubricht, Leipzig-Neustadt, Mariannenstrasse 30, III. r. Poŝtĉek-konto 43808, Leipzig.

## Mallongaj Esp. Scilgoj.

Finnlando.

En Helsinki du kursoj por 50 policoj. Paroladoj kaj kursoj en Jokikylä, Peräseinäjoki kaj Jalasjärvi. Alia parolado en Jeppo.

Francujo.

Nova grupo en Vaison (Vaucluse). Hon. prez. s-o Ulysse Fabre, prez. de la departementa konsilantaro. La kurso okazos en la urbdomo. Petu de s-o Blanc, instruisto, Esp. gvidlibron eldonitan de la urbestro kaj informojn pri komerco.

Belgiujo.

En Antwerpen, la Sindikato de la Antverpena Instruistaro malfermis kursojn; partoprenas 15 ĝisinstruistoj sub gvido de s-o J. Swalf. — La Sindikato de la Metallaboristoj ankaŭ aranĝis kursojn por staj membroj, el kiuj 40 respondis la alvokon instruas s-o Maurice Jaumotte.

Itallando.

La 18. junio prof. A. Lacalandola, del. de U. E. A. en Bari, paroladis en Bisceglie kaj montris Esp. cirkulerojn, gazetojn ktp. Poste li komencis kurson kaj fondis grupon de instruistoj kaj lernantoj.

Aliaj novaj grupoj en Comizo (30 membroj) kaj en S. Maria C. V. (Campania). Kurso de B. Morri en Venezia.

Komisio de Esp. Fervojista Unio en Torino estis akceptata la 8. junio ĉe la direkto de la fervoja „kompartimento“ de Torino. Ĝia estro, s-o kom. inĝ. Edilio Ehrenfreund, bone akceptis la proponojn prezentitajn kaj promesis personan interesiĝon por doni al Torinaj fervojistoj, kiel antaŭ nelonge faris la ĝen. direktoro de la „Fervojie dello Stato“ en Roma, lokon por biblioteko kaj kunvenejo, apud la centra stacidomo de Torino P. N. — Partoprenis en la komisio s-o Kav. Sacconi kiel reprezentanto de la Torina Esp. Asocio kaj la fervoj-oficistoj s-oj Ramolfo, Bisetti, Bonino kaj Torchio.

Hungarujo.

BUDAPEST. La nederlandaj mondvojaĝantoj estis dum unu semajno gastoj de la budapestaj samideanoj, kaj preskaŭ ĉiuvespere estis kunveno kun ili. Pri ilia alveno eĉ tag-jurnalo „Pesti Naplo“ skribis grandan artikolon, kaj ilia parolado en la Socia Muzeo estis neforgesebla por la ĉeestintoj. Al la bonkoraj, afablaj kaj kuraĝaj samideanoj ni deziras sukcesan bicikladon tra la tuta mondo! Spite de aliaj scilgoj, samideanoj G. Seubring kaj R. Stoeltje helpas per sia mondirado la propagadon de Esperanto kaj ne ĝenas la samideanojn per sia alveno.

MISKOLCZ. La grupo fervore preparas la landan kongreson por la 26. kaj 27. aŭgusto.

XV-a Kongreso de Esp. Asocio de Norda Ameriko

okazos la 12.—16. julio en Toronto, Kanada.

## Antaŭkongreso Danzig.

Germanoj, kiuj vizitos Danzigon kaj reveturos, post la Danziga kongreso, Germanion, nur bezonas vidrimarkon de kvartala policojo en siaj pasportoj, nenian vizon. Pvo! bezonas nenion alian ol sian pasportojn. La karavanestro de Danzig al Helsinki estos s-o Oberroiman, del. de UEA, Varsovio, Polujo.

Por katolikoj: En Danzig okazos Esp. prediko en preĝejo de S-ta Nikolao, de Ekl. Kons. Becker, Breslau.

## Gazetaro.

Washington Daily News, 6. 5. (Interesa art. „Back to Babel“ de E. E. Slosson pri int. lingvo.)  
L'Index des Industries du Cuir, Paris, junio. (Kun Esp. rubriko.)  
L'Information Universitaire, ĉa., Paris, 2. 6. (Instruado de Esp. en Germanlando.)  
L'Exportateur Français, Paris, 12. 6. (Esp. kaj kom. ĉambro de St. Omer.)  
Le Journal, Paris, 15. 6. (Kun ŝerca artikolo.)  
Le Travail, Genève, 8. 6. kaj Le Droit du Peuple, Lausanne, 8. 6. (Kun leteroj de d-ro Privat pri la Brita Esp. Kongr.)  
Nieuwe Hengelosche Courant, Hengelo, Nederl., 10. 6. (Esp. Konferenco en Genève.)  
Gazette van Gent, Belg., 15. 6. (Art. pri progresoj de Esperanto.)  
Neptune, Antwerpen, 5. 6. (Pri Brita Esp. Kongr.)  
Daily Telegraph, 5. 6. Daily Herald, 5. 6. Daily News, 5. 6. Daily Chronicle, 5. 6. kaj Morning Post, 5. 6. Ĉiuj en London, kun art. pri la Brita Esp. Kongreso.  
Reichenberger Zeitung, 15. 6. (Art. „Internacia kunagado de la grandaj folioj kaj Esperanto“.)  
Eugenia, Barcelona, junio. (Esp. fakoj.)  
Danziger Volksblatt, Danzig, 5. kaj 10. 6. (Esp. anglol.)  
Danziger Volksstimme, 30. 5. (Art. pri mondvojaĝanto s-o Hudson.)  
Zoppoter Zeitung, Danzig-Zoppot, 27. 5. (Esp. konferenco en Genève.)  
Volkszeitung, Bromberg, 17. 6. (Esp. angulo.)  
Piomienie, Kraków, Pol., 1. 6. Skolta revuo, kun Esp. angulo kaj koresponda fakoj. (Esp. fakoj.)  
Nowy Dziennik, Kraków, 10. 6. (Pola Esp. Kongreso.)  
Jutarnilist, Zagreb, 4. 6. (Longa art. pri „Esp. en Japanlando“.)  
Kärntner Tagespost, Villach, 9. 6. (Kun traduko de Letero al Pollando, laŭ ET.)  
La Calle, Madrid, 10. 6. (Kun traduko de „Famo“ el ET n-o 78.)  
Norsk Bokbinder-Tidende, Kristiania, 15. 6. (Artikolo pri Esperanto, en lingvoj norvega kaj Esperanta.)

## Recenzejo.

GAZETOJ.


Amerika Esperantisto. Majo.  
Esperanta Finnlando. Majo.  
Export-Esperantist. Majo.  
Holanda Esperantisto. 8. 6.  
Katolika Mondo. N-o 10.  
Litova Stelo. Marto-junio (kvarobla numero).  
L'Esperanto. Majo.  
Esperanto. Junio.  
(En rubriko „Niaj Mortintoj“ ni legas pri ainmortigo de s-o Adam-Lanty, red. de „Sennacieca Revuo“: ĉu malbona ŝerco?)  
Verda Utopio. Aprilo.  
La Verda Ombro. Febr., marto-aprilo.  
Holanda Esperantisto. 18. junio.  
Arguao. Aprilo.  
Sennacieca Revuo. Junio. Adreso: 177, rue de Bagnolet, Paris 20.  
The British Esperantist. Junio. Kun detala raporto pri la Brita Esp. Kongreso en London.  
Berliner Esperanto-Mitteilungen. Junio.  
Corriere Balcanico-Esperantista, Bari, 50. 5.  
Nova Eŭropo. Junio. Kun „Ĉeĥoslovaka Gazeto“.  
Fervoja Esperantisto. N-o 1. Fakorgano de Internacia Asocio de la Esp. Fervojistoj. Adreso: Praha II, Tešnov 10.  
Oriental Idisto. N-o 1. Marto. Adreso: A. Todoroff, Ul. Hayredin Pasha 5, Plovdiv, Bulg.

AFIŝOJ, PROPAGANDILOJ, ktp.

ESPERANTO ALS PÄDAGOGISCHES PROBLEM. (Esperanto kiel pedagogia problem.) Flugfolio pri la Esp. Konferenco en Genève, verkita de d-ro Trügel, Auerbach i. V.

LIBROJ.

MAGYAR-ESPERANTO-ZSEBSZOTAR. Készítette Dr. Schatz Robert. Masodik Javított Kiadás. Budapest 1922. Kokal Lajos Kiadása, IV, Kamermayer Karoly utca 5. — 160-paĝa hungara-Esperanta poŝtvortaro. Prezo ne monrita.  
SONORIL-KONCERTOJ DE MECHELEN. De Jef Denyn. Interesa libreto pri la mond fama sonoril-koncertoj de Mechelen (Malines). En lingvoj flandra, franca, angla kaj Esperanta. Prezo 1.25 belg. flk. Havebla ĉe Axel Baesens, rue de la Station 16, Mechelen, Belg.  
La libreto enhavas 55 paĝojn da teksto, portretoj kaj 3 vidaĵoj sur luksa papero, planon de Mechelen, diversajn vidaĵojn inter la teksto kaj multajn anonojn. La Esperanta teksto enhavas multe da eraroj. La preso de la libreto estas nigra kaj flava, tiu de la kovrilo blua kaj orbronzaj.  
KOREKTO de la eraraj tradukoj en Universala Vortaro. Kun aprobo de la Lingva Komitato. Franca parto. Prezo 50 cts. Paris, Esperantista Centra Libreto, 51 rue de Clichy.  
PRI LA DEVOJ DE L' HOMOJ. Parolado al junulo. De Silvio Pellico. El la itala lingvo tradukis D-ro A. Tellini. 94 pĝ. 12 x 16 cm. Kolekto de la Revuo „L'Esperanto“. Eldonis A. Paolet, S. Vito al Tagliamento (Italia) 1922. Prezo: Karion, 5 liroj.  
Antaŭ kelkaj semajnoj nur flugis libreto kun preskaŭ la sama titolo sur nian redakciejan tablon. Eatis: Devoj de la homoj (Mazzini), verkite, kies enhavo pritraktis



Lübeck. — Magistrata Domo.



socialajn temojn. Kvankam la libreto skribita de Pellico kvazaŭ „Bona konsilanto“ sin turnas al virganta junulo per la voĉo de pia, grandanima kaj nobla admonanto, estas rimarkinde, ke ambaŭ verkoj naŝkiĝis en la sama epoko de l' vekiganta kaj ekflamiganta patriotismo. Pellico (1789—1854) suferinta pli ol ok jaroj en malluma karceri havis tutsimilan vivostoron kiel la granda italo Mazzini. Leginte la anekdotaran rakonton de Pellico „Dum la tempo de mia mallibereco“ mi estas memorigita al la germana poeto Fritz Reuter. Kelkloke iliaj animopulsoj sin tuŝas. — Niaj italaj ploniroj agas laŭdinde, donante al ni historiejn momentojn kaj epizodojn el la vivo antaŭ cent jaroj, kies spegulo la poetoj-patriotoj alte tenas antaŭ ni. — La Pellico'a verko estas ankoraŭ hodiaŭ plenvigla legaĵo por ĉiulandaj junuloj. La perloj, kiujn homo suferinta marirecon dum longjara kaptiteco kaj maturiginta sub pezaj muroj de l' duonmorto, prezentas al la junularo, ne paliĝis. — Pli bonan instruilon primoralemi mi preskaŭ ne konas. — Al la tradukinto mi konsilas, ke li korektive sian ellaboritaĵon de kompetentulo, ĉar ĝi enhavas gramatikajn malkorektaĵojn nepre forigendajn. Kiel li mem diras en la antaŭparolo, li ilon jam scias; des pli bone. Ni ĝojos, se baldaŭ aperos la dua eldono en vesto lingve brila. (G. Ajul.)

**ITALAJ RAKONTOJ.** De Edmondo de Amicis. Tradukis el la itala lingvo D-ro P. C. Monti. 75 paĝ., 12-16 cm. Kolekto de la revuo „L' Esperanto“. Eldonis A. Paolet, S. Vito al Tagliamento (Italio) 1922. Prezo: Karton. 3 libroj aŭ 2 fr. fk. Lerte kaj zorgeme la tradukinto elektis ses el la plej ĉarmaj rakontoj de l' famekonata literaturisto itala de Amicis. Signifus porti strigojn al Ateno, se mi dirus multajn vortojn pri la granda poeto, kies verkojn konas tre multe da homoj. Dank' al du belaj tradukaĵoj de nia samideano Rosa Junck, Edmondo de Amicis (1846—1908) jam estas konata en la Esperanta literaturo. — En la ses rakontoj ni konsilas kun la karaktero de l' popolo itala; elokventeco kaj bonstilo ornamas ĉi tiun pentraĵon realecan. Kelkaj nekorektaĵoj kaj malglataĵoj ne senvalorigas la libreton, kaj ni ne dubas, ke nia literaturamanta legataro kontentigite envicigos la volumeton en sian libron. (G. Ajul.)

**AFIŝOJ, PROPAGANDILOJ, ktp.**  
AFIŝO iom stranga sed tre efika, malhel-verda preso sur helverda papero. Teksto: I-a Kongreso de Esperanto de ĉeĥoslovaka respubliko, Brno, 10-11. VI. 1922. — Formato 62 : 75 cm.

**FLUGFOLIO,** surhavanta en franca lingvo la konatan voĉdonon de franca Akademiano pri Esperanto, eldonita de Societo Kuba por la Propagando de Esperanto kaj dissendita al universitataj profesoroj, membroj de la Kuba Scienca Akademio, diplomatoj, membroj de la registaro k. a.



**Kiel vi aspektas?**  
Ĉion vidos viaj korespondantoj, se vi sendos al ili vian foton!

**Lasu multobligi vian portreton!**  
Mi estas pli malmultekosta ol via fotografisto.

Pecol:	20	50	100
Poŝtkartoj (brom-argenta) nigra	80.-	150.-	250.-
„ „ „ bruna-sepia	100.-	200.-	350.-
„ „ „ (lumpresaj)	—	—	150.-
Glumarkoj (poŝtmarka formato)	25.-	50.-	80.-
„ „ „ (formato 4 1/2 x 5 1/2 cm)	50.-	100.-	160.-
Pasportbildeto (formato 4 x 5 cm)	50.-	70.-	120.-
Vizitkartoj kun portreto	—	—	80.-
„ „ „ nur kun nomo	—	45.-	60.-

La prezoj estas en germanaj markoj. — Kvom tio 20% por sendkostoj. — Liverado nur kontraŭ antaŭa pago!  
**Arta Laborejo por Amasaj Multobligoj**  
**Ferna Versand, Plauen i. V., Germ.**

**La Interŝanĝo**  
Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondantoj, interŝanĝoj kaj komercaj interrilatoj aperas sep fojojn jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, ne enkalkulante la liston de la aliĝantoj sendatan nur al la abonintoj.  
Jara abonprezo: 10 francaj frankoj.  
Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.  
**A. Bonnefous, Direktoro, Béziers (Hérault), Francujo, 3, rue du Capus, et 22, rue Viennet.**

**Anoncetoj.**  
Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinekvaj impresoj) kostas po du impresoj kaj po 20 vortoj 0.20 dol., 0.50 hfl., 1 nord. kr., 1 sil., 1 sviz. fk., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fk., 3 ilr., 7 mk., 8 kč., 30 gmk., 75 hung. kr., 300 gmk., 500 austr. kr., internacie 5 stamp. resp. kup.; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdezire de la aboninto, de aliaj ni impresas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas alveni 10 tagojn antaŭ publikigo.  
**KURT SCHEFFLER.** — Samideano (ino), kiu scias ion pri la sorto de s-o Kurt Scheffler, Esperantisto, antaŭ la milito loĝinta en Sakslanda vilaĝo Tannenberghaus (poŝtoficejo Jägersgrün), estas tre petata aciligi al s-o J. Golubev, P. O. Romanovka, Primorokaj obi., Petrovka, der. Linda, tra Vladivostok, Siberio.  
**RUSOJ KAJ SIBERIANOJ.** Alientu! — Sendu al ni vian fotografon kaj 50 nedifektajn, plejoble malsamajn, neuzitajn kaj stampitajn poŝtmarkojn, kaj vi ricevos de ni 50 lumarkojn aŭ 12 belajn poŝtkartojn kun via portreto. — Ferna-Versand, Plauen i. V., Germanujo.  
**GAZETKOLEKTAĴO,** proks. 1000 div. ekzempleroj, 160 div. spekoj, inter ili tre valoraj, malmultekoste aĉetebla ĉe Bihari Mór, Népszínház u. 27-IV-31, Budapest, Hung.  
**LA REVUO.** Mi avertis „La Revuo“, 7-a jaro n-oj 2 kaj 4, 8 a jaro n-o 10. Pagas altan prezon. — Martin Blicher, Bredgade 63, III, Kopenhago, Danlando.  
**KRIOJ DE L' KORO, de Selo Grenkamp-Kornfeld,** afrankite gmk. 10. — „Unuaj Agordoj“, de Elski kaj Eska, afrankite gmk. 20. — Liveras Eldonejo „Esperantista Voĉo“, Jaslo, Pollando.  
**PLI MALKARE OL ĈIE.** — Kontraŭ referencoj ni forsendas poŝtmark elektajn. Livereblaj de ĉiuj landoj, speciale polaj, ukrainaj, rusaj ktp. — Al demandoj aldonu por respondo! — Eldonejo „Esperantista Voĉo“, Jaslo, Pollando.

**Itala Vino**  
Unuakvalitajn vinojn de la Piedmonto kaj Toskanio eksportas al ĉiuj landoj  
**La Fermo GIOVARA Fedele**  
Via Ciamarella 5, Torino (Italio).  
Plej granda seriozeco.  
Oni korespondas prefere Esperante.

**Dr. Vogt'sche Bank, Stuttgart, Germ.**  
Wallruthbau Komandit-Societo Friedrichstr. 13  
Telefona: N-oj 11458 kaj 11459. — Telegr. Adreso: Bankvogt.  
Aĉeto kaj vendo de valorpapiroj.  
Procentado de kontantaj deponoj.  
Aĉeto kaj vendo de fremdaj valutoj.  
Perado de ĉiusepacaj negocoj.

**Tipografistoj en la tuta mondo atentu!**  
La centra komitato de la svisa societo de maŝinkompostistoj deziras havi kunlaborantojn pri fakaj el la tuta mondo kaj de ĉiuj maŝinstemoj por sia oficiala organo „Der Maschinensetzer — Compositeur à la machine“ (La maŝinkompostisto). Precepe oni deziras informojn pri labor- kaj salajrkondiĉoj. Artikoloj estas akceptataj en germana, franca kaj Esperanta lingvoj kaj ili estas pagataj laŭpove.

Manuskripton oni sendu al: Karl Jost, monoflisto, Cullmannstrasse n-o 57, Zürich, Svislando.

Nederlanda Anonima Societo  
**Luksa-pano Fabrikoj**  
antaŭe Henri J. Carels.  
50 Butikoj:  
Den Haag, Haarlem, Amsterdam.  
**Lunĉejo Carels**  
(ĉefo: H.A. Scharwächter)  
63 Welmarstraat, Den Haag.  
Oni parolas Esperanton.

**Esperanto Service Corporation „ESKO“**  
500 Fifth Avenue New York City  
Telegrafa adreso: Esperanto New York.

Aĉeto, eksporto, importo kaj maklerado de ĉiusepacaj komercaĵoj.  
Katalogoj, prezaroj kaj specimenoj estas danke ricevataj

**KURACISTVIDVINO** akceptos du junajn, klerajn allandulojn. Plena pensiono kaj familia aliĝo. Muzika kaj lingva instruado en la domo. S-ino D-ro Hempel, Dresden-A, Zoellnerstr. 19. Rekomendita de s-ino Marie Hankel.  
**LETERVESPERON** aranĝos Societo Esperantista de Västera, „La Verda Stelo“, la 28-an de julio 1922. Sendu tiuj lerojn kaj kartojn (markitajn: „Letervespero“) al s-o Q.N.: son Irborn, Fiskartorget 3, Västera, Svedujo. Ĉiuj ricevos respondon.  
**BES'a ADRESARO.** Prezo 1.50 sviz. fk., germanoj 33 mk. Krome sendkostoj. Havelia ĉe Esp. Eldonejo Butin & Jung, Godesberg, Germ.

**KOMERCAJN INTERILATOJN,** eventuale reprezentadon de germaniaj (saksaj) fabrikoj de tolaĵo, ŝtrumpetoj kaj laŭmoda komercaĵoj por sinjoroj serĉas solida importita firma en Argentino. — Skribu al s-o A. Bartoš, Praha-Nusle 170-62, Ĉeĥoslovakio.  
**Korespondo kaj Interŝanĝo.**  
**L. Jürisson,** instrulisto de gimnazio, Haapsalu, Saksia, Estonio, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn de Eŭropo, prefere laŭ katalogo Michel 1921/22.  
**W. J. Bijlert,** Nieuwe Schoolstraat 18, G., Den Haag, Hollandio, interŝanĝas poŝtmarkojn de ĉiuj landoj, escepte Polujo kaj Ĉeĥoslovakio.  
**Geskoltoj!** Mi deziras korespondi kun skoltoj en la tuta mondo pri la skoltaj movadoj (skoltismo) per poŝtkartoj ilustr. kaj leroj. — Paul Kundi, Merseburg, Germanio, Gothaerstr. 8.  
Kiu sendos 200 nedifektajn poŝtmarkojn el sia lando ricevos samvaloran kvanton da ĉeĥoslovakaj poŝtmarkoj kaj belegan panoraman karton de mia urbo. — Antonin Uher, Praha, II, Jindřišská ul. 51.

**Stettin.**  
Multaj partoprenantoj de la XIV-a Kongreso en Helsinki sendube ŝipveturos de Stettin al Finnlando. Al ili mi donas jenajn informojn pri la duŝraŭba ŝipo „Rügen“:  
Alveturo sabaton, la 5-an de aŭgusto je la 4-a pm.; alveno en Helsinki lundon, la 7-an de aŭg. tagmeze. Prezoj: I-a klaso (kun manĝo) 5000 mk. (germ.) plus aldonu por unuopa kajuto 400 gmk.; II-a klaso 4000 gmk. (kun manĝo); interferdeko 2000 gmk. (sen manĝo).  
**Reveturo** merkredon la 16. VIII. je la 1-a tm; alveno en Stettin vendredon antaŭtagmeze. Prezoj: I-a kl. 900 fmk., aldonu por kajuto 75 fmk.; III-a kl. 750 fmk., inter-ferd. 350 fmk. (sen manĝo).  
Fervoja alveturado de ĉiu flanko tre oportuna. Kiu tamen devas aŭ volas pasigi nokton en Stettino, iu estas peŝata tiel baldaŭ kiel eble skribi al mi siajn eventualajn dezirojn rilate al hotelo aŭ senpaga noktostango ĉe samideanoj (en malgranda nombro), la precizan tempon de sia alveno en Stettin ktp. La aranĝo de malgranda saluvespero nia grupo dependigos de la cirkonstancoj. Alvenante en nia stadidomo atentu verdan flagon aŭ Esperantan afiŝon. Pro la ŝipvojaĝo per „Rügen“ mi rekomendas antaŭmendon ĉe la ŝiparanĝejo Gribel, Stettin, Gr. Lasiadie 36 aŭ ĉe lia agente M. Balzer, Berlin, Jägerstr. 20 aŭ ĉe iu ajn porvojaĝa kontoro.  
Rektoro **Krieger**, Stettin, Klosterhof 25.  
Luna prezidanto de la Esp.-Verein Stettin.

**Sperta Komercisto**  
deziras agi kiel sola Agento en Skotlando  
por grava ne-teksta manufabrika firma aŭ eksporta sindikato. Pli bonaj rekomendoj donotaj kaj mon-garantio povas esti aranĝita. — Samideanoj bonvolu traduki tiun ĉi anoncon kaj sendi ĝin al gravaj firmoj en via distrikto! — Ofertojn peras la administracio de „Esperanto Triumfonta“.

**Abonejoj de ET en la landoj**  
Aŭstra: Ferd. P. Huber, Münchberg 5, Salzburg; por Wien „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postamt 84  
Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beersstraat, Antwerpen. Poŝt-ĉeka n-o 284 20.  
Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia  
Ĉeĥoslovaka: Otto Štlenčka, Hradek Královce. Otto Lumpe, Trautenau.  
Estonia: Est. Esp. Unuiĝo, poŝtkast. 6, Tallinn.  
Finna: O/V. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.  
Franca: Esp. Centra Librejo, 81 rue de Cligny, Paris 9.  
Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy Catalan.  
Hungara: Paŭlo Balkányi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.  
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.  
Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.  
Litova: Paŭlo v. Medem, Smellu g-ve 12, Kaunas (Kovno).  
Pola: Adolfo Oberroman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 3125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordecklego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.  
Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.  
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1 U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Mondfama verko, kiun devas legi ĉiu samideano:  
**B. v. Suttner, For la Batalilojn!**  
Prezo 50 gmk., por mezbonvalutuloj 80 gmk., por bonvalutuloj 100 gmk. — Por pakado kaj sendkostoj aldonu 10 gmk., negermanoj 15 gmk.  
Esperanto-Eldonejo  
**Butin & Jung, Godesberg, Germ.**

**HUNGARA VINO.**  
La Tokaj-Hegyalla-Provinca Vin-komerca A. S. Budapest  
malmultekoste  
eksportas unuarangajn vinojn al ĉiuj landoj.  
(En lastaj monatoj oni sendis al Brazilio, Ĉinio, Nederlando, Germanio.)  
— Botelvinoj. —  
Mondfamaj „Tokaj“-vinoj!  
Seriozaj firmoj kaj reprezentantoj ricevas ofertojn pere de  
**Paŭlo Balkányi, Budapest VI, Hajos u. 15.**

**Nederlanda Esperanta Komerc-Oficejo**  
(Nederlandsch Esperanto-Handelsbureau)  
Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)  
Tradukas cirkulerojn, komercajn lerojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝarĝas per la dissendo de cirkuleroj.  
Prokuras komercajn adresojn.  
Prizorgas la anoncadon en Nederlando.  
Interrilatiĝas kun nederlandaj komercistoj kaj industriistoj.  
Sciligas la kurzojn de valutoj kaj valorpapiroj.

**Al ĉiulandaj abstinentuloj.**  
La demando pri alkohola permeso estas nuntempe en tagordo en diversaj landoj. Kiel konate, en Finnlando ekzistas jam de kelkaj jaroj alkoholmalpermesa leĝo (Kielolaki). Pro tio estas tre interese precipe por eksterlandanoj aŭdi kaj ekscii la influon de la leĝo al la vivado de la popolo.  
La Finnlanda Ligo por Alkoholmalpermeso (Kielolaki) invitas ĉiujn interesulojn de la mondo partopreni en la faka kongreso de abstinentuloj dum la XIV-a en Helsinki. La Ligo faras ĉion eblan por bone kaj sukcese aranĝi la kunvenon.

La Ligo por Alkoholmalpermeso konsistas el diversaj gravaj sociaj asocioj reformemaj kaj socialista, el parlamentaj grupoj, komunumoj ktp., enhavante pli ol 500 000 anojn. La estraranoj de Ligo estas malnovaj famaj abstinentuloj de nia lando: verkisto S. Aikio, profesoro V. Voionmaa, superdirektoro de la lerneja administracio M. Solinen, fama sciencisto prof. T. Lahtinen, nuna instrua ministro N. Liakka ktp.  
Ĉiujn demandojn koncerne la fakan kunsidon bonvolu adresi al Kielolaki, Helsinki.

**ET numero 100**  
(jubilea numero) aperos la 3-an de septembro 1922 en eksterordinare granda eldonnombro kaj minimume 6-paĝa, kun speciala 16-paĝa literatura aldono.  
Al varbontoj de  
**ANONCOJ**  
(ne anoncetoj) por tiu ĉi numero ni konsentas **Rekompencon de 30%**  
La prezo de anoncoj por tiu ĉi numero estas por ĉiuj landoj po centimetro-kvadrato 5 gmk., sed sen rabato por la anoncetoj.

**S-o Murakami,** ĵurnalistoj, Redaktejo de Kyushu-Nippo Fukuoka, Japanujo, deziras korespondadi kun allandanoj nur per poŝtkartoj ilustritaj.  
**Fraŭlo L. Bonzon, Grand'Rue 20, Montreux, Sviz.,** deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun ekster-eŭropanoj, balkanaj kaj baltaj ŝtatoj.  
**Du mezlernejaj amikoj** volas korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj. — Jozefo Krausz, skolto, Pécs, F. Malom u. 18. — Banjuo Guitman, Pécs, Majlaih tér 5, Hungario.  
**Junulo, 18-jara gimnaziano,** deziras korespondi kun ĝeĵunuloj el la tuta mondo per leroj! Adreso: Todor K Popov, Petriĉ, Bulgarlando.  
**Erich Kleppisch,** helpanto en Esp. eldonejo, Dresden A 24, Schnorrstr. 27, Saksujo, deziras korespondi kun samideanoj ĉiulandaj per ilustr. poŝtkartoj (bfl.), leroj, kolektas poŝtmarkojn kaj papermonojn eksterlandajn, interŝanĝas fotografetojn.  
**Rudolf Preuss,** ĵuna poŝtoficejo, Dresden, Böhmische Str. 21, Germanujo, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj al leroj kun la tuta mondo.  
**S-o Albin Korn,** Ruslando, Petrograd Fontanka 17, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per leroj. — Kiu abonos por mi „Esp. Finn.“, „Nov. Eŭrop.“ k. a., al tiu mi sendos rusajn poŝtmarkojn (caraj, sovjetaj, uzitaj kaj neuzitaj), Esp. presajojn, nacilingvaj gazetojn kaj revuojn ktp. — Gesamideanoj! neniam demandu pri mia konsento por korespondado aŭ interŝanĝado, sed komencu aferon tu!

**Esperantistino Apollonia Pileva,** Ruslando, Petrograd, Fontanka 17, deziras interŝanĝi Esp. gazetojn kaj librojn. Por sovjetaj poŝtmarkoj mi deziras ricevi Parizan, Londonan aŭ Berlinan ĵurnalon de modaj kostumoj.  
**19-jarulo** deziras korespondi kun la tuta mondo. — Hans Weigl, Hasendorf 30, poŝto Köflach, Stirio, Aŭstrujo.